# Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL - TRIMONATA BULTENO

N°38a (nova serio) - N°123a - Decembro 1976

**Prizorgas :** Maryse + Pierre Lemarchand 43 rue Desseaux 76100 ROUEN .

**Eldonita de :** la ESPERANTO - Grupoj de la Ruena Regiono .

**Sendu la manuskriptojn antaŭ la :** 10a de februaro - 10a de majo -
10a de aŭgusto - 10a de novembro -

**UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE :** c.c.p. : ROUEN 283 40 H .

**Kotizoj :** Por 1977 : Minimuma kotizo : 5,00 Fr. Subtenkotizo ek de 10,00 Fr.
Nura abono al Normanda Esperanto Bulteno sen membreco : 5,00 Fr.

" La verkantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj "

# NIAJ KUNVENOJ

La Normandaj samideanoj honoris ZAMENHOF, organizante regionan renkontiĝon en la Ruena Junulgastejo la 11an kaj 12an de decembro. Malgraŭ la neoportuna dato : ekloco de malbela vetero, nebulo, danĝeraj vojoj kaj proksimeco de familiaj finjaraj festoj, pli ol 40 gesamideanoj partoprenis la sabatan kaj la dimanĉan kunvenojn kaj ĝuis la konfor-ton de la Ruena Junulgastejo.

Sud-normandoj kaj membroj de la diversaj grupoj en Seine Maritime partoprenis ti-un manifestacion. Ni povas nur bedaŭri ke la plej proksimaj, t.e. la Ruenanoj estis malmultnombraj. Revuoto estis ludata de Havra teatra grupeto, eĉ dum la skeĉo, ni povis imagi ke la Respublikestra Moŝto honoris nian kunvenon ! Gratulojn por la Havranoj !

Post prezentado de Esperanto-parolantaj filmoj, ni povis gustumi krespojn. Vizitis ankaŭ la kunvenon kelkaj Parizanoj kiuj kontribuis al la programo. Bedaŭrinde ne povis okazi la kunveno de J.E.F.O. Sinjoroj GUILLAUME kaj ROUSSEAU prelegis pri U.E.A. kaj ankaŭ pri ISLANDO kie okazos la Universala Kongreso. Ni povis admiri bele-gajn diapozitivojn pri tiu stranga lando kaj ni esperas ke tio incitos kelkajn Nor-mandojn tien kongresi. Kvankam simpla la komuna tagmanĝo kontribuis al bonhumoro kaj gajeco de ĉeestantoj. Ĉiuj disiris kontentaj esperante sin revidi baldaŭ.

Polycopié par le Groupe Espérantiste Rouennais . DEPOT LEGAL : 4e Trimestre 1976
.Le gérant : P. LEMARCHAND.

.../... Kun komencas nova jaro; la estraro deziras ke ĝi estu bona por ĉiuj kaj favora por nia idealo. Ni jam devas pensi pri organizado de la generala kunveno de U.N.E. Al ĉiuj ni povas anonci agrablan informon : ĝi okazos en Sud-Normandio. Post diversaj klopodoj, ni sukcesis havi la permeson organizi nian kongreseton en "La Maison Familiale, Manoirs des Pères." en OUILLY le VICOMTE apud LISIEUX, sur la vojo kondukanta al Pont-L'Eveque. Sinjoro Martin informis nin ke tiu domo estas vasta, komforta kaj ĉirkaŭata de arbara parko. La regiono estas belega. Tiu kunveno okazos :

<u>Sabato 23an kaj dimanĉo 24an de aprilo 1977a.</u>

Ni profitas tiun informon por fari al vi jenan alvokon : nia movado eble ne progresas pro manko de aktivuloj. Ni bone komprenas ke ne ĉiuj povas fariĝi aktivuloj sed ĉiuj devus disponi minimume du aŭ tri tagojn ĉiujare por helpi al propagando. Ni ĉiam timas organizi oficialan kongreson kun invito de oficialuloj, ĵurnalistoj kaj televido, ĉar ni ofte ne estas sufiĉe multnombraj. Ne partoprenante niajn kunvenojn, multaj sinceraj esperantistoj tiel kontraŭpropagandas kaj kontraŭas niajn strebojn. Bonvolu do, - nepre - , rezervigi la ĉi-supre anoncitajn datojn. La estraro de nia Unuiĝo klopodos aranĝi agrablan programon. Dank'al suno kaj beleco de la naturo, ĉiuj estos kontentegaj. Incitu viajn geamikojn partopreni la kunvenon ! Ĉiu normanda esperantisto sin sentu mobilizata por la sukceso de nia regiona kongreseto !

<u>Petro KIJO.</u>

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

# PROTOKOLOJ

## Estrara Kunsido de U.N.E.

La estraro de U.N.E. kunvenis en la Junulgastejo de ROUEN la 4an de decembro 76a je la 14a horo. Ĉeestis la kunvenon Sroj Quillaud, Jouis, Lemarchand, Gibaux, Pottier .

<u>ZAMENHOFA RENKONTIĜO</u> :

Unue la estraranoj vizitis la Junulgastejon, kie okazos la Zamenhofa Renkontiĝo la 11an kaj 12an de decembro kaj konstatis, ke ĝi estas bonega ejo, perfekte taŭga kaj bone hejtata.

Poste Sro Lemarchand anoncis, ke li ĝis nun ricevis 29 aliĝilojn, kaj la estraro diskutis kelkajn detalojn de la programo. Oni decidis precipe, ke la vizito de la Muzeo Secq des Tournelles okazos sabate posttagmeze. Oni iru tien piede aŭ aŭtobuse por eviti la trafik- kaj parkadproblemojn. Eble Sro Rousseau el Caen prezentos ion pri Maroko aŭ Madagaskaro sabato vespere. Ankaŭ teatraĵetoj okazos tiam. Dimanĉe Sro Guillaume kaj Rousseau el Pariso prezentos programon matene. Posttagmeze okazos projekciado de lumbildoj pri Islando. Por tiuj, kiuj ne volas mem prepari sian manĝon sabate vespere, estos eble manĝi en la Junuldomo tre proksime, aŭ en restoracio ĉe strato Lafayette.

<u>GENERALA KUNVENO EN MAJO</u> :

Sro Martin okupiĝis pri "Manoir des Pères" uzata kiel " Maison Familiale " li obtenis la permeson de la deputito kaj de la respondeculo.

Ni devos pagi la kunkciadon de la hejtado kaj la diversajn elspezojn (250 F). Ni devos informiĝi pri la dato kiam la loko estos libera.

<u>EKSPOZICIO LENTAIGNE</u> :

Sro Lemarchand kontaktos Sron Semet por scii ĉu li povos ĉeesti la kongreson de la FREINET movado. Se li akceptos, ni zorgos pri la ekspozicio kaj pri la eksterlandanoj. Se ne Sro Mary akceptos ĉeesti la kongreson. Sro Gibaux kontaktos lin.

<u>KASO</u> :

Sro Jouis anoncas, ke nun, pro la akiro de la mono apartenanta al la grupo en Sotteville, l kaso enhavas 1.875,00 F

<u>BULTENO</u> :

La lasta bulteno ne estis tre bone presita pro malbona funkciado de la skribmaŝino kaj de la multobligilo. Sino Peltier skribis por peti ke oni ne vendu la multobligilon de U.N.E. Ni pristudos la problemon de ĝia riparo.

<u>VENONTA KUNVENO</u> :

Ĝi okazos sabaton la 19an de marto <u>aŭ</u> la 26an de marto en LE HAVRE ĉe Sro Gibaux.

Sro Quillaud fermis la kunsidon je la 17h15.

Sro POTTIER.

# NIA VIVO EN ... YVETOT

Du kursoj regule funkcias en la Junulejo : unuagrada kurso ĉiulunde je la 18a horo kun 4 lernantinoj, kaj duagrada kurso ĉiuvendrede je la 18a horo kun 2 lernantinoj. Ambaŭ kur--soj funkcias tre kontentige.
La Ĝenerala Kunveno de la grupo okazis la 3an de decembro vespere. Gesinjoroj POTTIER tiam montris belan binditan kolekton da malnovaj revuoj donacitaj al la grupo fare de Sino BOUVIER el Villequier kies patro estis esperantisto. Dum la kunveno, la ĉeestantoj bedaŭris ke la grupa vivo ne estis sufiĉe vigla dum la pasinta jaro, krom la Reĝkuka Festo, kiu estis ĉeestata de 70 personoj el kiuj 40 Yvetotanoj. Oni do faris projektojn, ĉefe pri printempa pikniko aŭ renkontiĝo por festi la 10 jarojn da ekzistado de la grupo post ĝia revekiĝo, kaj se eble, inviti de eksterlandaj prelegistoj. Fine, la ĉeestantoj reelektis senŝanĝe la antaŭan estraron. La [illegible] Reĝkuka Festo okazis en la restoracio la 16an de januaro je la 14a horo kaj daŭris kun la partopreno de ĉirkaŭ 40 personoj.

Sro POTTIER;

# LE HAVRE

ĜENERALA KUNVENO

Ĝi okazis la 16an de Oktobro en la Ejo François 1er.
17 Membroj ĉe estis, kaj 3 personoj senkulpigis sin.
El la Morala Raporto, oni povas ĉerpi kelkajn erojn :
La Kursoj okazis laŭ la antaŭplanita agado, kvankam kun malmulte da lernantoj .
La Monataj Kunvenoj estas daŭre vizitataj ,kaj oni kore invitas la malnovajn ,kiel la novajn membrojn kunesti ; notu bone :ĉiu tria sabato de la monato, en nia Ejo, ĉambro François 1er, 17a horo
La Jarfesto, dum Februaro, en Sanvic,estas plaĉa rememoro, kaj donis okazon saluti eksterurbajn vizitantojn.
La Vizito de niaj geamikoj de Southampton estis prokrastigata : ni konsilas ke ĉiu notu la daton de la efektiva vizito : 7a kaj 8a de Majo
La Gazetoj en Le Havre rigardas nin kun favora sento : ĉu estas bona aŭguro por la estontaj kursoj ?
La Kaso ,kiel ĉiuj monujoj,suferas pro la inflacio ; jen la sola motivo de la pliigo de la kotizo kiu fariĝas 10 Fk.
La Komitato eliranta estis reelektita unuanime

KOMITATA KUNVENO

Ĉe S-ro Chalm,la 20an de Oktobro ,kunvenis ,cele al difino de la agado por la venonta jarperiodo, la ĵus elektitoj.
Kursoj : Jam 4 enskriboj por la komenca kurso,kiun gvidos S-ron Chalm ĉe la M.J.C. . Nia amiko ankaŭ prenas sur sin la taskon de la konver-sacia kurso,ĉiuvendrede, en la Liceo Porte Océane. S-ino Sery,siaflanke daŭrigas la instruadon de unu el siaj du lernantinoj de la lasta jaro .
Monataj Kunvenoj : Jam ni havis la plezuron aŭdi la prezenton de Sinjo-rinoj Gontard kaj Mercier ,la 20an de Oktobro pri la Asocio " La Natur-Amikoj " . La 18an de Decembro, Sylvie Caron parolos al ni pri la " Superstiĉoj " .
Manifestacioj : La Havranoj nepre notu tiujn datojn ,por apogi, ĉe esti, tiujn renkontiĝojn en Le Havre, aŭ en nia Provinco :
11 kaj 12a de Decembro = Zamenhofa Renkontiĝo en Rouen
18a Februaro = Komuna Vespermanĝo ĉe M.J.C. 2 Avenue Foch
07a de Aprilo = Kongreso Freinet en Rouen: instruistoj ĉefe koncernataj
07a kaj 08a de Majo = Akcepto de la Sotanoj (niaj amikoj de Southampton)
15a de Majo = Kongreso de la Federacio en Trouville
23/24 ~~Majo~~ Aprilo = Ĝenerala Kunveno de UHE

Sro Gibaux

la Tagaso Viox javan Kotizon al U.N. 5,00 F minimume — Dankon U.N.E. C.C.P. Rouen 283.40

# Chronique Espérantiste

Artikolo el "La voix le Bocage" 15/10/76 sendita de Sro Legret Vire.

Une proposition de loi tendant à inclure l'espéranto dans l'enseignement secondaire comme langue facultative a été déposée par cent sept députés sous l'impulsion de Monsieur Rougetet, ingénieur E.T.P., vice-président du Comité Français d'information sur l'Espéranto. Tous les parlementaires français ont été contactés à ce sujet par les organisations espérantiste.

Le 61ème Congrès Universel d'Espéranto a eu lieu à Athènes du 31 juillet au 7 août. Il a réuni près de 1.400 personnes venues de 51 pays du monde. Un peu auparavant s'était tenu à Thessalonique le congrès des jeunes espérantistes qui réunissait 350 participants. Les deux congrès ont comporté les séances de travail et les distractions habituelles (théâtre, danse, concours littéraires, excursions). Le prochain Congrès Universel aura lieu en Islande.

Un manuel de conversation (auquel s'ajoute un lexique) en trois langues - anglais, français, espéranto - a été distribué aux 11.400 athlètes et aux 1.200 jeunes gens qui ont participé aux Jeux Olympiques de Montréal. Ce manuel de 121 pages, œuvre de l'Ambassadeur Ralph Henry, a été édité par l'Association Espérantiste du Canada. Roger Rousseau, président du Comité d'Organisation des Jeux Olympiques, a rédigé l'avant-propos - très élogieux - de ce manuel.

Depuis plusieurs années Mme Tessencourt, directrice du Théâtre Montausier et Thierry Maulnier, de l'Académie Française, organisent à Versailles un concours théâtral pour les jeunes. Cette année pour la première fois s'y est présenté le Théâtre Espérantiste de Paris avec Andromaque dans la traduction de G. Lagrange. Les spectateurs non espérantistes ont semblé comprendre et apprécier. Le jury a accordé au Théâtre Espérantiste de Paris un prix spécial pour la belle mise en scène.

Monsieur Mc Lennan, délégué espérantiste d'Exeter (Devon - Grande-Bretagne) a de nouveau (pour la 4ème fois) visité notre ville en juillet dernier. Il a vivement apprécié l'exposition de la Porte-Horloge. Venu de Cherbourg, Monsieur Mc Lennan se rendait au Château de Grésillon - près de Beaugé (Maine-et-Loire) - où ont lieu chaque année des stages espérantistes et des rencontres internationales très fréquentées.

Pour tous renseignements sur l'espéranto s'adresser à : Legret D. 14, rue Sablonnières. Vire. Où à l'Union Française pour l'Espéranto 4 bis rue de la Cerisaie. Paris (4ème).

## CAEN

Esperanto kurso komencis la ĵaŭdon 7an de oktobro 76a je la 18h30 en la "Centre Socio Culturel du Chemin Vert, rue Pierre Corneille en CAEN.
Dum la unuaj kursoj ĉeestis 11 lernantoj ĉiufoje. La ĉeestantoj estas junaj : inter 11 kaj 40 jaraĝaj, kaj ĉiuj ŝajnas sufiĉe interesataj.
Laŭ raporto de Sro ROUSSEAU.

## ANONCETOJ !



Dezirus aĉeti loĝejon 3/4 ĉefaj ĉambroj bona stato-kun dependaĵoj kaj terspaco, almenaŭ 1.000 m2. Situo : tre proksime al Lisieux aŭ Pont L'Evêque.
S-ino PELTIER 55 rue de Richelieu
76600 LE HAVRE

Por viaj Kunvenoj, Festoj, Kongresoj...
LA ESPERANTISTA MAGIISTO LUDOVIK
Ĵonglisto-Ventroparolanto kun filo LUIZO
skribu al S-ro L.LANEY
91 rue de la Laiterie 76610 LE HAVRE

## LINGVA ANGULO

" PERFEKTIĜI ESTAS DEVO "

Provu traduki tiujn frazojn, kaj POSTE, sed nur poste, kontrolu ĉe la kvina paĝo, ĉu vi bone tradukis :

Il est sorti <u>en courant</u>. / C'est <u>en forgeant</u> qu'on devient forgeron. /
L'appétit vient <u>en mangeant</u>.

# Jaraj Kotizoj

En la lasta numero de B.E.B. jam aperis la kotiztabeloj de 1) Universala Esperanto Asocio.
2) Federation Espérantiste du Travail.
3.) Franca Katolika Esperanto Asocio.
Jen estas kelkaj jaraj kotizoj de aliaj Esperanto-Asocioj

4 - SAT - AMIKARO : 67 avenue Gambetta 75020 Paris. Tel 797.87.05.
- abono + jara kotizo : 40,00 Fr . Peranto : André Sadier 22 Avenue P.-V. Couturier, Bât. E.D. 93000 Bobigny. C.C.P. : 7658.05 G Paris.

5 - SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA : S.A.T. 67 avenue Gambetta 75020 Paris. C.C.P. Paris 1234.22.
- abono al Sennaciulo + jara kotizo : 68,00 Fr.
- d° + d° + Sennacieca Revuo : 72,00 Fr.
- Samfamilianoj pagas duonkotizon.

6 - FRANCA FERVOJISTA ESPERANTO ASOCIO : C.C.P. Paris 7402 60 L.
- Aktiva membro : 20,00 Fr. - Samfamiliano : 5,00 Fr.
- Emerito : 15,00 Fr. - Nura abono al Esp.-Fervojisto : 10,00 Fr.

7 - NATURAMIKOJ : ESPERANTO - MIGRANTO. Pagoj al G. LEBEC 10 rue Jean Mermoz 94340 Joinville le Pont. C.C.P. : 10.508.65 Paris. Jarabono al la "MIGRANTO" : 16,00 Fr.
- Aktivaj membroj : 38,00 Fr.
- Junuloj 15/21 jaraj : 23,00 Fr.
- Familianoj : 23,00 Fr.
- Infanoj ĝis la 14a jaro : 5,00 Fr.

8 - INTERNACIA ESPERANTO CENTRO de la MONDCIVITANOJ : 8 rue Rouget de Lisle 30000 NIMES.
- C.C.P. : Renée Valpellière 1078.06 Montpellier.
- Legitimkarto : 10,00 Fr. - Jara Kotizo : propravole.

9 - UNIVERSALA LIGO : Centra Oficejo : Postbus 334 BUSSUM 1351 NEDERLANDO.
- Abono + kotizo : 10 nederlandaj Guldenoj
Poŝta Ĝirkonto : Nederlando DEN HAAG 40.88.26. Universala Ligo.

10 - UNUIĜO FRANCA POR ESPERANTO : 4 bis rue de la Cerisaie. 75004 Paris. Tel : 278.63.86.
- Regiona peranto : Federation Normande des Centres Culturels Esperanto.
C.C.P. Rouen : 2348.06 C.
- "Ami de l'Espéranto" : 17,00 Fr. - Simpla Membro : 17,00 Fr.
- Membro abonanto -22j. : 51,00 Fr. - Dumviva Membro Abonanto : 1.400,00 F.
-26j. : 70,00 Fr. - Membro subtenanto : 105,oo Fr.
+26j. : 70,00 Fr. - Membro bonfaranto : 175,oo Fr.

11 - FRANCA EVANGELIA ESPERANTO LIGO C.C.P. 10.456.15 U Paris.
- Por la kotizoj kaj abonoj, rilatu kun la Sekretario-kasisto Sro André BACHELIER 6 impasse des Marronniers 93600 Aulnay sous Bois.

12 - ESPERANTISTA KULTURDOMO - KASTELO de GRESILLON - Baugé. C.C.P. : Nantes 1425.39.
- Amis de Grésillon : 5,00 Fr.
- Abono al la revuo de Grésillon : "KULTURAJ KAJEROJ" , simpla : 25,00 Fr.
P. BABIN. C.C.P. Nantes 2.813.61. bonfara : 30,00 Fr.

---

## LINGVA ANGULO (S O L V O)

Kurante, li eliris el ...(ekz. ...la kafejo) ( LI kuras kaj LI eliras ).
Forĝante, oni fariĝas forĝisto (ONI forĝas, kaj ONI fariĝas forĝisto.)
Ne tradukebla estas la frazo ! (MI manĝas ; APETITO venas). La subjekto de "en mangeant" NE ESTAS LA SAMA KIEL TIU DE "VENAS".
Oni devas modifi la frazon : " Dum manĝo, akiriĝas apetito."
Dum oni manĝas , oni akiras apetiton. / Manĝante (mi), mi akiras apetiton.
La particip-adverbo nepre devas rilati al la subjekto de la propozicio ĉefa.

Traduku kaj sendu vian tradukon al Sro LENTAIGNE, 3 av. de la Gaillarde 34000 Montpellier.
" La fortune lui vint en dormant. - Il s'est fait mal en sautant. - En observant le ciel, il a découvert une étoile inconnue. "

---

## ALVOKO !

Ne forgesu rezervi la semajnfinon :
Sabato 23an kaj dimanĉo 24an de APRILO 77a
por ĉeesti nian jaran Ĝeneralan Kunvenon en MANOIRS des PARCS
en OUILLY le VICOMTE apud LISIEUX !!!!!!!!!!!!
Programo de la renkontiĝo, aliĝilo aperos en la venonta bulteno !

## 33a Internacia Junulara Kongreso en POITIERS.

La 32a I.J.K. de TEJO okazinta en Tesaloniko estis unu el la plej sukcesaj en la longa vico de I.J.K.oj. Do vi nepre devos retrovi la unikan etoson de tiaj aranĝoj okaze de la venonta I.J.K. !

Ĉi foje ĝi okazos en Francio, kaj ne en Islando kiel la Universala Kongreso : Datoj : 9a ĝis 16a de aŭgusto 1977, do tuj post la U.K. Kiel kongresejo estis elektita la universitato de Poitiers.

### POITIERS : romantika arto kaj konjako.

Poitiers, ĉefurbo de la departemento Vienne, en la kerno de la provinco Poitou, troviĝas ĉe la kruco de ĉefaj historiaj vojoj. Ĝia nomo estas internacie konata pro tiu batalo kiam, en la jaro 732, Charles Martel haltis la araban invadon. Hodiaŭ, kun 100.000 enloĝantoj, Poitiers malrapide industriiĝas. La urbo kaj la ĉirkaŭanta regiono estas riĉaj je monumentoj el ĉiuj epokoj de la historio. La regiono Poitou, lulilo de la romantika arto, famiĝis ankaŭ pro la tutmonde konata likvoro Konjako tie produktata.

### Kongreso kun rabelesa fono.

La universitato de Poitiers estis fondita en 1431, dum la Centjara Milito, por kontraŭ--stari la parizan universitaton Sorbonne. Pri la tiama ĝoja studenta vivo atestas en siaj libroj Rabelais, kiu tie studis.

La studenta vivo en Poiteirs estas ankoraŭ tiel ĝoja, kiel en la epoko de Rabelais, kvankam la nuna universitato, kie okazos la I.J.K., estas moderna aro de konstruaĵoj, kelkajn kilometrojn for de la urbocentro. La partoprenantoj de la I.J.K. loĝos en unulitaj komfortoplenaj ĉambroj kun skribotablo, varm-akva lavujo k.t.p. La dormejoj, la kongresejoj kaj la manĝejo (memserva restoracio) situas unu apud la aliaj.

La temo de la kongreso estos : "problemoj de organizado kaj disvolviĝo de la esperantis--taj junularaj movadoj" Tiu I.J.K. estos okazo por interŝanĝi ideojn, raciigi nian laboron, kun la celo pli efike interveni kaj propagandi en aliaj junularaj movadoj, ĉar multaj junaj esperantistoj havas spertojn pri agado en junularaj movadoj.

Krom kutimaj kunsidoj kaj interkonatiĝa, adiaŭa kaj internacia vesperoj, estas planitaj ankaŭ teatra kaj kabareta vesperoj prezentotaj de TESPA. (Teatro ESperanto de Parizo).

### Postkongreso en Parizo.

Ĉar multaj kongresanoj deziros restadi kelkajn tagojn en Parizo post la I.J.K. la Kongresa Komitato rezervos ĉambrojn en junulardomoj kaj provos organizi kelkajn vizitojn helpe de lokaj esperantistoj. La prezoj estos inter 24 kaj 38 francaj Frankoj tage, por restado de 3 aŭ 6 tagoj.

### Kiel aliĝi ? :


Vi povas ricevi aliĝilon petante ĝin al J.E.F.O. (Junulara Esperantista Franca Organizo) 4 bis rue de la Cerisaie, 75004 PARIS. Por aliĝi sendu aliĝilon kaj kotizon al J.E.F.O., C.C.P. 31 709 94 Y LA SOURCE, Se vi deziras partopreni la postkongreson en Parizo sendu antaŭpagon de 20,00 Fr. al J.E.F.O. (precizigu: "por la tranoktado en Parizo").

### Kotiztabelo :

La prezoj inkluzivas ĉion : loĝadon, manĝojn, programon. Individuaj membroj de TEJO/UEA ĝuas rabaton de 25,00 Fr.

Frua aliĝo signifas malaltan kotizon !

| Aĝo de la partoprenanto | Dato de la aliĝo → | ĝis marto | Aprilo ĝis junio | Julio |
|---|---|---|---|---|
| | Malpli ol 18 j. | 335,00 Fr. | 355,00 Fr. | 375,00 Fr. |
| | 18 – 21 j. | 350,00 Fr. | 370,00 Fr. | 395,00 Fr. |
| | 22 – 25 j. | 365,00 Fr. | 390,00 Fr. | 415,00 Fr. |
| | 26 – 29 j. | 395,00 Fr. | 420,00 Fr. | 445,00 Fr. |
| | Pli ol 30 j. | 425,00 Fr. | 450,00 Fr. | 475,00 Fr. |




Venu multnombraj

La O.K.K. atendas 400 partoprenantojn el pluraj dekoj da landoj.